
# BONA ESPERO



**Cirkulero 72**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.** **decembro 2010**

prezidanto: Bernd Schönberner ★ Westermannweg 17 B ★ D-30419 Hannover
☏ +49-(0) 511 7 63 63 565 ★ 💻 schoenberner.bernd@t-online.de

*Karaj amikoj kaj subtenantoj,*
*antaŭ kelkaj tagoj Ursula sendis al mi jenan leteron kun interesaj novaĵoj pri Bona Espero:*



**La nova lernoĉambro plene funkcias** ek de la komenco de la lernojaro. Per siaj 60 kvadrataj metroj de aero, ĝi praktike duobligas la spacon de nia lernejo kaj faciligas la disdividon de la gelernantoj en kvin elementajn klasojn.
La nova instruisto Gilnei Almeida dos Santos anstataŭas la instruistinon Maria da Silva Rodrigues, kiu revenis al la lernejo de Alto Paraíso, ĉefe pro la fakto ke sia filino devas frekventi tie la sesan jaron kaj ne plu povas lerni en Bona Espero.
Ĉijare lernas en Bona Espero 28 gelernantoj inter 4 kaj 13 jaroj el kiuj la duono loĝas konstante en Bona Espero kaj la aliaj alvenas ĉiujtage el la ĉirkaŭaj bienoj per aŭtobuso de la urbestraro.
**La hejmo kie loĝas la infanoj** estis komplete renovigita per aldono de plafonoj, reformoj kaj farbado de sep dormoĉambroj kaj du grandaj restadĉambroj. Oni fermis kaj kovris parte per tegmento la internan korton de la domo plivastigante la aeron kie la infanoj povas ludi dum la pluv-sezono. Ricardo konstruis domon en la legomejo por gardi semojn kaj laborilojn - iĝis palaceto! Ankaŭ tre aktuala estas do nia nova projekto, parte subvenciata de Rotary Internacia.



Temas pri **Vento-Muelilo** 24 metrojn alta, por pumpi akvon rekte el nia largo kaj irigacii niajn plantejojn je distanco de 600 metroj, sen disperdigi la akvon, kiel okazas nun per niaj gravit-pumpilo kaj akvo-rado.

| donacokonto: | kasistino: |
|---|---|
| **konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede** | Dagmar Rahn ¤ Hirschfeldstr. 3 ¤ D-59581 Warstein |
| **(BLZ / bankkodo 464 510 12)** | ☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328 |
| **IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484** | 💻 dagmar@rahn76.de |
| **BIC : WELADED1MES** | |



Ni ne povas paroli pri la pluva, kiam la **seka sezono** estas tiel severa ĉijare. Praktike ne pluvas de pli ol cent dudek tagoj kaj la tuta centra regiono de Brazilo estas viktimo de daŭraj incendioj en la savano kaj suferas pro tre malalta humideco ĝis 15%. Ĝuste kiam ni komentis, ke feliĉe ne alvenis ĉijare fajro en Bona Espero, el malantaŭ la monto aperis grandega nubo de fumo kaj dum du tagoj ni devis batali kontraŭ fajro kiu praktike bruligis 90% de la teritorio de Bona Espero. Kun peno ni, per helpo de la najbaroj nokte kaj de fajrobrigadistoj de Alto Paraíso, sukcesis savi nian legomejon kaj la domojn, sed parto de la tubaro de nia lago kaj la elektraj dratoj de nia instalaĵo bruliĝis kaj ni estas anstataŭigantaj ilin.



*La forbrulita kampo*



*La infanoj helpas estingi la fajron*

Ursula informis min (30an de novembro rete), ke oni altransportis al Bona Espero ĝis nun 300 fostoj el cemento por la nova barilo. Ĉiuj fosto pesas 40 kilogramojn. Nun devas la fortaj viroj meti la fostojn en la teron.

**La vojaĝo tra Eŭropo de Ursula kaj Guiseppe** ...



Kelkaj membroj de nia Societo havis la okazon renkonti ilin dum julio/aŭgusto ĉijare. Verdire ne temis pri "turisma" vojaĝo, sed iaspecia pilgrimado por viziti geamikojn kaj subtenantojn, esperantistojn kaj rotarianojn en Italio, Germanio, Belgio, Nederlando kaj Francio kun lasta partopreno dum esperantista evento en Pluezec (Bretonio), kie kreiĝis lastatempe grupo de amikoj de Bona Espero.
(*foto: Labor-renkontiĝo en Hanovro kun Bernd kaj Petra Schönberner*)

En Colmar ili estis gastoj ĉe la familio de Michel Basso aktivulo de TAKE kaj iniciatinto de la projekto "Plantu Arbon!" en kiu Bona Espero partoprenas per plantado kaj zorgado dum preskaŭ 3 jaroj de 500 arboj de la savano.

**.... sed kun surprizoj je ilia reveno!**

Fripona najbaro, konata en la regiono kiel ŝtelisto de grundo, instigis alian najbaron konstrui ponton super unu el niaj riveretoj por invadi la teritorion de Bona Espero per traktora vojo 3 kilometrojn longa. La sentaŭgulo tamen ne perceptis, ke li invadis ankaŭ la Nacian Parkon, kiu limas kun Bona Espero kaj tio estas krimo, kiun la estraro de la parko tuj denuncis. Nun la ŝtelisto devis pagi tre grandan monpunon kaj li ricevos ankoraŭ proceson.

Alia malagrabla okazintaĵo estis la murdo de nia bona amiko Divaldo Rinco, urbestro de Alto Paraíso, per la mano de politika kontraŭulo. Ĵus okazis en Brazilo la politikaj bataloj kaj en regiono la animoj ekscitiĝis, sed neniam oni atingis tiun nivelon de perforto! La tuta urbo partoprenis la funebrojn, sed la murdisto fuĝis kaj en ĉi tiu vasta lando, li povas kaŝi sin facile.

**La voluntuloj:** Ankaŭ ĉijare donis kaj donas sian valoran kontribuon. Nuntempe restadas ĉe ni juna belgo, Marteen Deprez, studento de antropologio, kiu ricevis apartan permeson de sia universitato por "staĝo" en Bona Espero kie oni aplikas en la praktiko la sciencon pri la evoluo de homoj kaj pri iliaj faritaĵoj. Komence li tuj batalis por estingi fajron, kiu laŭdire, estis rezulto de "faritaĵo de homoj".

Alia malnova amiko de Bona Espero, Amarilio Carvalho restadas nuntempe ĉe ni. Li estas kompetenta historiisto pri Brazilo kaj danke al li sukcese organizis "Kulturan Eventon" en nia urba sidejo kunlabore kun la loka Rotaria Klubo. Temis pri monologo de la vivo kaj morto de la patrono de nia lando, Tiradentes, martiro pri la sendependeco de Brazilo en la 18-a jarcento.

***Plej nova informo el Bona Espero (30a de novembro):*** *Ek nun oni povas komuniki direkte per reto, ĉar la ministro por komunikado plenumis nian grandan peton. Nun ekzistas en Bona Espero granda satelito-anteno kaj oni povas uzi reton el nia granda salono. Krom tio la "Banco do Brasil" donis al ni 10 komputilojn.*



*La "Kolping-familio" de Meschede subtenas ankaŭ ĉi-tiu jaron per granda parto de la gajno de la tradicia "Christkindelmarkt" (bazaro) Bonan Esperon.*

*La foto montras la momenton antaŭ kiam la amaso da aĉetantoj veni en la halon.*

**donacokonto:**
**konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede**
**(BLZ / bankkodo 464 510 12)**
**IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484**
**BIC : WELADED1MES**

kasistino:
Dagmar Rahn ¤ Hirschfeldstr. 3 ¤ D-59581 Warstein
☎+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328
💻 dagmar@rahn76.de

***Infanoj de la baza lernejo Reinöhlschule en Heilbronn*** *helpas Bonan Esperon :*




*La instruistino Irmi Vallon skribis:*
*''Kadre de nia temo "Infanoj de nia mondo" mi informis mian duan klason pri la incendio en Bona Espero. Ili tuj decidis helpi. Do ni organizis pulbazareton por vendi malnovajn ludilojn. La gepatroj ankaŭ deziris subteni nian projekton kaj bakis kuketojn, kiujn oni vendis surla korto de la lernejo. Entute ni enspezis 250 Eŭrojn kaj la gelernatoj multe fieris pri tiu sukceso. Mi transpagis la monon sur la konto de via asocio. Mi aldonas kelkajn fotojn pri niaj agadoj kaj esperas, ke nia kontribuo ĝojigas la gelernantojn en Bona Espero.*
*Elkore salutas vin Irmi Vallon''*

Anonco:

La magiisto DON ESPERO havas nun pli da tempo por prezenti sian magian programon, ĉar li nun estas pensiulo. La gaĝo estos via donaco al Bona Espero.
Bv.kontakti min! Mi loĝas nun en Hanovro.
telefono: 0511 / 7 63 63 565




## Benitan kristnaskon
## kaj feliĉan novan jaron!



*Bernd Schönberner*

Kial Sankta Nikolao ne povas eniri en tiu ĉi domo?



La ŝtuparo estas optika trompo!

**donacokonto:**
**konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede**
**(BLZ / bankkodo 464 510 12)**
**IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484**
**BIC : WELADED1MES**

kasistino:
Dagmar Rahn ⌑ Hirschfeldstr. 3 ⌑ D-59581 Warstein
☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328
💻 dagmar@rahn76.de